Manfred Hausmann,

# La akvofalo

*tradukita de Chiu Ling Chang*

De alto de dek-mil futoj,
kvazaŭ de la ĉielo
la kaskado fluge ĵetas sin suben,
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas
nimbo jen ruĝa jen purpura.
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,
rekte falas inter arboj kaj tra la nebulo;
en la serena vetero aŭdeblas
bruo de vento kaj pluvo.
Kiel majestas la monto Lushan!
La nebulo kaj la akvo harmonie
kunfandiĝas en fean iluminacion.

. . .

Manfred Hausmann,

# La akvofalo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala
en la abismon tie ĉi.
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala
akvofumo eliĝas el ĝi.

De l' altej' nebulvualo
subeniĝas tie ĉi,
ĝi ruliĝas tra la valo,
de la arboj gutas ĝi.

Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta
estas arko el odor'
kaj la akvo estas bruanta
kvazaŭ tondro en la for'.

El la verdo de l' arbaro
rokoj supren levas sin.
La prafort' de l' vivantaro
bolas jen en la ravin'.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Der Wasserfall" de* Manfred Hausmann *(*1898-09-10 – †1986-08-06) en ĉina de* Chiu Ling Chang *(*673 – †740).*

*Arg-945-1989 (2014-04-01 18:00:10)*

*Traduko de la Germana poemo "Der Wasserfall" de* Manfred Hausmann *(*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(*1938-11-04) en 2013-12.*

*Arg-945-1901 (2014-03-19 15:12:32)*